

Kion proponas Karolo Piĉ ?

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 535, 1981.11.26 & 28

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La du pasintajn semajnojn ni prezentis al vi, karaj geaŭdantoj, la neordinaran romanon "La Litomiŝla Tombejo" de Karolo Piĉ. Ankoraŭ dum du elsendoj ni revenos al tiu ĉi libro, kiun eldonis Arthur E. Iltis en Saarbrücken, pro la lingva kaj interlingvistika signifoj de la verko.

A.- Inter la romano kaj la glosaro, kiu estas la leksika ŝlosilo de la verko, Karolo Piĉ publikigas studindan eseon. Ĝia temo estas:

Cl.- "La romano kaj ĝiaj lingvaj rimedoj".

A.- Ni konsilas ĉiujn legontojn de la romano, unue tralegi tiun ĉi eseon. Ili tiam komprenos, ke la romano mem estu konsiderata kiel lingva eksperimento. Cetere pri tiu ĉi eksperimento Karolo Piĉ sin interese esprimas konklude al sia eseo. Ni citas lin:

C1.- "La esperanta romano estas la plej grava ilo de la lingva maturiĝado. Ĝi disponigas al la lingvo taŭgan eksperimentospaĉon. Kaj ĝi ebligas, ke ĝi provadu diversajn formojn rekte "enterene"... "La romanaj formoj restas absolute demokratiaj kaj nedevegaj: ili ne trudas sin, ili sin sol montras kiel modelulinoj. Ĉar la beletra, romana sublingvo prezentas nur ĉiel privatan pure individuan parolmanieron de ĉiel privataj kaj individuaj romanaj roluloj, kiuj povas erari kaj kiuj fakte eĉ eraras, ne esprimante sin ĉiam tute ĝuste kaj korekte. Sed jen kaj jen ili, eble, uzas eĉ parolturnojn kaj terminojn, kiujn la legantoj trovos imitindaj kaj utilaj. La romano tiel estas iaspeca lingvistika foiro. Ĝi sugestas ian modon. Tamen pri tio, ĉu la modo akceptiĝos aŭ ne, decidus lastinstance ĉiam nur la publiko, kiu la prezentitajn modelojn aŭ aprobas kaj promovos, aŭ malakceptos kaj rifuzos."

A.- Post tiu citaĵo per aliaj citaĵoj, ni provu resume prezenti la vidpunktojn de Karolo Piĉ, kiu ne estas iu ajn esperantisto. Vi povas trovi la nomon de tiu ĉeĥa esperanto-verkisto inter la membroj de la Akademio de Esperanto. Ni esperas, ke liajn tezojn, kiuj lingve enkorpiĝis en lia romano "La Litomiŝla Tombejo", la esperantistoj objekte analizos. Niaj radio-prelegoj malfermu tiun ĉi studon en serena etoso, por ke al la lingva eksperimentado de Karolo Piĉ ne respondu nur rigida kontraŭstaro.

C1.- Karolo Piĉ opinias, ni citas lin, ke "alte ellaborita, artisma prozo estas neebila sen alte ellaborita, artisma, riĉa kaj ĉiel esprimiva, nuancoza lingvo."

A.- Karolo Piĉ, per sia eseo kaj per sia romano, volas, "en la kadro de la sistemo, fari nian lingvon pri riĉa, pli kompleta, tio estas pli leĝera kaj pli moderna."

Cl.- Jen kiel li sin esprimas por komprenigi sian vidpunkton:

A.- "Per la vortostoko de la Plena Gramatiko kaj de la Plena Vortaro oni ne povis skribi ion alian, ol kion oni skribis. Kaj oni skribis elstarajn pecojn, eĉ se oni mezuras ilin per la mezuriloj de aliaj poezioj. Sed, jen, ĉio! La poezia parnasisma lingvaĵo ne povis pli multe. Ĝi ne kapablis esprimi la poeziecon de la profano, ĉar por tio mankis al ĝi ilo, la vortaro de la profano. Dum pluraj jaroj oni tion ne rimarkis. La poezio estis io eksterordinara kaj dimanĉa. Tiu dimanĉa poezio havis sian dimanĉan, parnasan vorto-stokon. Kaj ĉio iris glate kaj

senĝene. Dum pluraj jaroj oni vartis la versistikon kaj neglektis la prozistikon. Kaj kiam, fine, oni turnis la atenton ankaŭ al la romano, oni povis, ve, nur konstati ĝian mizeran kaj bedaŭrindan staton kaj ĝian ĝeneralan postrestintecon.

C1.- "Sed ankaŭ tie ĉi, daŭrigas Karolo Piĉ, la Parnasa stoko sufiĉis nur por tio, por kio ĝi sufiĉis. Jes, mi scias, multon necesas alkalkuli ankaŭ al la malforteco de la aŭtoroj. La ĉefa kialo tamen estis alia. Oni iel forgesis, ke la vivo ne konsistas nur el dimanĉoj. Se la poezio, dumtempe kaj iam, povas havi nur dimanĉojn, la prozo ne povas havi nur dimanĉojn. La ordinara semajno de ĉiu ordinara romano havas ja ankaŭ bluajn lundojn, blankajn mardojn, aĉajn merkredojn, verdajn ĵaŭdojn, nigrajn vendredojn kaj senagajn sabatojn. Kaj ankaŭ ĉiuj ĉi bezonas siajn specialajn kaj adekvatajn fakvortarojn kaj esprimojn, tiel ke sen moderna Esperanto ne estas moderna prozo. Kaj jen la hiko!

A.- "Al Esperanto, antaŭ ĉio, mankas profanaj, ĉiutagaj konversaciaj parolelementoj, stilo kaj vortaro. La mizera nivelo de la esperantaj konversacioj estas, cetere, notore konata. Tamen sen taŭgaj, trafaj kaj sukaj terminoj, sen kurtaj kaj koncizaj parolturnoj, sen abundaj kliŝoj kaj diversaj mallongaj vortetoj ne eblas vivaj babiloj.

C1.- Karolo Piĉ komprenigas sian penson per ekzemplo:

A.- "Io...estas konversacio pri novismoj. Kaj io alia disputo inter ebria edzo, ĵus alrampinta hejmen kvarkrure, kaj inter lia furioza edzino, kiu lin vane atendis ĝis la dua nokte. Mi konfesas, ke mi kapablas dum dek horoj, senpaŭze, prediki pri novismoj. Mi konfesas, ke eĉ dum kvin minutoj mi ne kapablas kontinue ŝpini ebriulan disputon. Simple tial, ŝar jam post tri, kvar frazoj venus fino al mia latino. Pardonu! Mi venus al la rando de mia Esperanto.

C1.- Karolo Piĉ listigas, en sia eseo pri "la romano kaj ĝiaj lingvaj problemoj, kion bezonas la romana lingvaĵo, por povi maturiĝi. Konklude al tiu ĉi prelego, ni citos tiujn ĉi punktojn, kiujn ni provos komentarii per citaĵoj okaze de nia venontsemajna elsendo. Jen do kion pensas Karolo Piĉ :

A.- "La romana lingvaĵo ne povos maturiĝi sen:

C1.- precizaj terminoj por ĉiuj objektoj de la ĉirkaŭa mondo;

A.- aro da vastsencaj terminoj laŭeble polisignifaj;

C1.- necesa sinonimigo kaj sinonimizo de la vortaro;

A.- riĉe disvolvita sistemo afiksa;

C1.- abundo da kliŝoj kaj diversaj malgrandaj vortetoj (prepozicioj, konjunkcioj, pseŭdoadverboj, interjekcioj);

A.- plua aglutinigo de la tuta vortaro, kiu kondukos al la konsekvenca aplikado de la dua parto de la 15-a regulo, kaj al retrodeduktado, kiu estas unu el la neeldiritaj principoj de la Plena Ilustrita Vortaro;

C1.- ĝisfunda malnaturaligo kaj raciigo de la sistemo;

A.- kuraĝa ĉerpado el la propraj fontoj kaj provizoj;

Cl.- kelkaj urĝaj pliprecizigoj kaj korektoj;

A.- kaj fine ĝenerala koncizigo, malpezigo kaj elastigo de la stilo."

C1.- Karolo Piĉ proponas al la verkistoj tutan programon.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond ek prezentis al vi la ĉijare eldonitan romanon "La Litomiŝla TomLejo" de Karolo Piĉ. La venontan semajnon ni daŭrigos la prezentadon de tiu ĉi kandidato al la "Verko de la Jaro 1981". Gis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), aŭgusto 2012*